

Omaĝe al d-ro August BRAUN (2), el la memoraĵoj de R. SANDOZ

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1986.07.17

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-174/Radiokasedo-174-15-86-A-1081-Claude-kaj-Andree-GACOND-Omaghe-al-d-ro-August-BRAUN-2-el-memorajhoj-de-R-Sandoz.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

La pasintan semajnon ni raportis pri ceremonio okazinta en Kultura Centro Esperantista, la 26-an de aprilo, omaĝe al d-ro August Braun, prezidanto de la Centro ekde ties fondo en 1968 ĝis 1984. Hodiaŭ ni prezentas la personecon de la prezidinto de Kultura Centro Esperantista tra mesaĝo de intima amiko, kiu alportis du fotojn de August Braun. Fotojn fiksotajn en la salono, kiu ricevis la nomon 'Salono August Braun'. La kontribuo de René Sandoz, kiun ni legos nun al vi, alportas iom intimajn prikonsiderojn, kiuj prilumas la profundan amikecon, kiu ligis la du homojn.

A.- Mi renkontis August Braun por la unua fojo en 1946. En tiu epoko, mi laboris ĉe la Civila Flughaveno de Dübendorf (Zürich) kiel veterkonjektisto por la linioj eŭropaj kaj internaciaj. Ni estis ekipo de licenciitoj pri sciencoj kaj fiziko por plenumi tiun respondecon, helpataj de du desegnistinoj lertaj kaj kompetentaj, kiuj starigis meteorologian mapon ĉiun trian horon. Poste ni analizis kaj interpretis tiujn mapojn por redakti la veterkonjektojn sur la flugvojo de aviadiloj forirantaj de Ziirich. Tuj mi rimarkis lian grandan sciencan kompetentecon kaj lian karakteron iom romantikan, en la plej bona senco de la vorto. Ofte lia ridado komunikema sonis en niaj oficejoj. De tiu epoko datumas ambaŭ fotoj lokigitaj en la salono, kiu de nun portas lian nomon en La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Ni pasigis kelkfoje niajn liberhorojn kune kaj mi aparte memoras pri komuna ekskurso en Schynige Platte, bovinmonto unuflanke, sed abrupta rokego aliflanke. Solothurna lerneja ekskurso okazis tie; subite, junulineto el tiu lernejo, provante pluki kelkajn florojn, falegis vertikale cent metrojn suben, tute proksime de ni. Ne estante taŭge ekipitaj por montaro, ni klopodis proksimiĝi de la akcidentita knabino farante grandan turnvojon, sed aliuloj antaŭvenis al ŝi. La kompatindulineto, agonianta, mortis en la reventrajno. Je tiu okazo, mi alte aprezis lian solidaran sindonsencon.

A.- La laboro, kiu okupis nin en Dübendorf, estis tre peniga pro tro reduktita ekipo, ĉefe kiam ni devis deĵori tage kaj nokte. Por plibonigi nian situacion, la Alta Direkcio donis al ni, ve, nur svagajn promesojn, neniam realigitajn. Pro tio, kvin el ni, el kiuj August Braun, forlasis post unu jaro tiun postenon, kiu tamen intereseis nin, por trovi alian okupadon.

Cl.- Tiel okazis lia transloĝiĝo en Neuchâtel, kie li estis dungita kiel specialisto pri matalurgio kaj metalkunfandado, de Svisa Laboratorio pri horloĝaj esploroj, en septembro 1947. Mi mem (diras René Sandoz) fariĝis direktoro de angla lernejo; sekve de tio niaj vojoj disiĝis, sed ne por longa tempo.

A.- Efektive, en majo 1949 mi revenis Neŭŝatelon por tie defendi mian tezon pri klimatologio, poste instrui sciencojn ĉe la duagrada lernejo de Boudry-distrikto, kaj ekloĝante en Areuse. Ambaŭ edziĝintaj, sen infanoj, ni retroviĝis tiam ĉu en Neuchâtel, ĉu en Areuse.

Cl.- En 1958 li akiris (do, d-ro August Braun) al si belan vilaeton en Hauterive, arte kaj ame instalitan de sia unua edzino, origina el Grizono. De tie oni ĝuis tre vastan elvidon super la Neŭŝatela lago kaj la Alpoj, de Santis ĝis Blanka Monto. Tio kontrastis kun la situacio de mia propra domo, en la Areuse-a ebenaĵo kaj ĉirkaŭita de verda natur-kurteno. Ĉar ambaŭ niaj edzinoj bone akordiĝis, ni alternigis niajn oftajn renkontojn, foje en Hauterive, foje en Areuse. Mi memoras plezure pri la belaj vesperoj pasigitaj kune, ofte ĉirkaŭ fromaĝa rakledo "raclette" aŭ manĝante en la ĝardeno, ĉe li aŭ ĉe mi. Ni tiam dialogis ofte pri muziko, foje kun pian-demanstroj liaflanke, ĉar li tre bone ludis je tiu instrumento. Diskuttemoj ne mankis, ĉar, de tiu epoko, mi komencis fundamentan esploradon por klarigi la fakton, ke oni povas ŝati muzikon ne lerninte ĝin, kio signifus diri, ke oni povus kompreni "lingvon", ne lerninte ĝin! Tiu esplorado kondukis min al neatenditaj konkludoj, foje konsentaj, foje oponaj al la ideoj de Majstro Ernest Ansermet. Duvorte: male al Ansermet mi demonstris, ke la homo havas muzikkonscion bazitan sur la gamo temperita (pro formo de la interna orelo) kaj ne laŭ la Pythagora gamo. Aliflanke, konsente kun Ansermet kaj pli bone ol li, mi opinias, mi demonstris science kial "dodekafonismo" ne povas esti komprenata kaj ŝatata de sincera publiko. Vi ja komprenas, ke la diskutoj de tiuj agrablaj vesperoj estis tre riĉaj kaj fruktodonaj. Mi konservas ankoraŭ en miaj arkivoj kelkajn kalkulojn, kiujn August Braun faris per sia eta komputero por kontroli la pravecon de miaj teorioj. Foje, dum ni estis absorbitaj en la sciencprofundoj, niaj edzinoj promenis en la ĝardeno, interŝanĝante konfidencojn pri floroj, aŭ, kiu scias, pri siaj edzoj! Ni ĝuis ĉeesti la aranĝon de lia bela ĝardeno, de lia plensuna naĝejo, trinkis la agrablajn produktojn de lia vinberejo. Tiu tuta periodo lasas al mi impreson harmonie ĝojan kaj vivantan, en vera amikeco.

A.- De 1969 ĝis 1971, nomiĝinta provizora direktoro de Gimnazio Pestalozzi en Kinŝasa, mi foriris por du jaroj en Zairo kun mia edzino. Malfeliĉe tio okazis dum kruela periodo por August Braun, ĉar lia edzino mortis la 4-an de decembro 1969 post tre dolora malsano.

Cl.- Je nia reveno el Afriko, ni vizitis lin kaj ekkonis lian duan edzinon, originan el Ĉeĥoslovakio. Aliflanke, li ĵus adoptis la filon de tiu ĉi. Lia nova bopatrino havis agrablajn afablaĵojn al li, ĉar li ne povis elteni solecon kiu sekvis, sufiĉe frue post tiu reedziĝo. Fakte, lia dua edzino trovis postenon en Winterthur kiel pianprofesorino kaj nur tre malofte revenis al Hauterive. Por li komenciĝis do longa periodo de adaptiĝo al soleco.

La venontan semajnon ni citos el alia omaĝo al August Braun. Hodiaŭ ni raportis el tiu de René Sandoz, intima amiko.

Vi aŭdas Svisan Radion Internacian. Claude kaj Andrée Gacond diras: Ĝis reaŭdo!